MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN VLAAMSE ESPERANTO-BOND

JARKOLEKTO
JAARGANG 2 N° 8 DEC.1982.

---

# Informilo

---

VERANTW. UITGEVER
RESPONDECA ELDONANTO JAN BOVENDEERD, SPEELTUINLAAN 14, B-2510 MORTSEL

I N F O R M I L O — Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Aperas ĉiumonate, krom en julio kaj aŭgusto
Abono : BF 150,-

---

| | |
|---|---|
| FLANDRA ESPERANTO-LIGO | Frankrijklei 140,2000 ANTWERPEN - 03/234 34 00<br>Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 |
| E S T R A R O | Edw. SYMOENS, Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT 03/666 62 66<br>prezidanto/Informado, Planado/Agado |
| | Roger DE SCHEPPER, Doornstraat 22<br>2610 WILRIJK 03/827 24 40<br>vic-prezidanto/interna revizoro/buĝetoj |
| | Jules VERSTRAETEN, St. Bernardsesteenweg 1078<br>2710 HOBOKEN 03/827 66 43<br>estrarano pri financoj |
| | Jan DOVENDEERD, Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL 03/449 50 06<br>sekretario/kunordigado |
| | Paul PEERAERTS, Kloosterstraat 35<br>2000 ANTWERPEN<br>direktoro de GCA/ librotenado |
| | Kristin TYTGAT, St. Hatebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL 03/449 50 24<br>reprezentanto FLEJA |
| K O M I S I I T O J | Hilde VANINGELGEM, Arbeidstraat 21, 9300 AALST<br>Trees DOOMS, Knaptandstraat 36, 2700 St. NIKLAAS<br>intergrupa agado |
| | André STAES, Jan Denucéstraat 1/198 2020 ANTWERPEN<br>kadrokursoj |
| | Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2 2000 ANTWERPEN<br>literaturaj, tradukaj, eldonaj aferoj |
| | Annie BOLLAERTS, Zomerlaan 16, 1500 HALLE<br>Herman DECEUNINCK, Floralaan 21, 1510 HALLE-BUIZINGEN<br>gazetara servo |
| | Ivo DURWAEL, P. Gilsonlaan 5, 2520 EDEGEM<br>volontula servo |
| FAKAJ KUNLABORANTOJ | Wim DE SMET, Hertendreef 33, 2180 KALMTHOUT<br>sciencoj |
| | Willy HUYBRECHTS, Rozendreef 33, 2180 KALMTHOUT<br>komputeraj aferoj |

---



Kara Leganto,

Sur la sojlo de 1983, la estraro de FEL deziras al vi kaj al viaj familianoj, amikoj, parencoj ĉion bonan : abundon da sano, prospero, sukceso, alivorte ĉion kio estas necesa por esti tute feliĉa.

1983. Jaro de la komunikado. Unua jaro el serio de kvin kadre de la preparo al la jubilea jaro 1987. Ampleksa programo estas preta kaj estos lanĉita antaŭlonge. Pri ĝi vi certe ankoraŭ multon aŭdos kaj legos.

Io al kio ni volas speciale atentigi estas via persona valoro en la tuto. Nia movado dependas de nia ĉies persona fideleco kaj ag-preteco.

Tutunua ago estas renovigi vian membrecon kaj klopodi membrigi aŭ remembrigi tiom kiom eble da aliaj personoj. Tiurilate ni referencas al la protokoloj pri la pasintaj kunsidoj kaj pli speciale al tiu pri la ĝenerala kunsido oktobra.

Ne-pretervidinde grava esta la neceso je kunlaborado, de la grupoj vid'al vide FEL, de FEL vid'al vide UEA. Tiuj ĉi komplete dependas de la bona volo, ĉefe de siaj kadromembroj. Vi, do.

Permesu al ni insiste peti al vi sekvi la konsilojn, respondi ĉu age ĉu skribe ĉu buŝe al la alvokoj de la estraro por permesi al ĝi bonorde kunlabori en la ĝenerala, de UEA kunmetita programo mondskala.

Ni ripetas, nur la bona volo kaj kunlaborpreteco de ni ĉiuj garantios sukcesan agadon.

Eblas ke tio, kio estas de vi petata, ne strikte kongruas kun viaj personaj preferoj. Tamen ne forgesu ke, se ni pretas fari nur tion kio plaĉas al ni kaj ne akcepti kelkmanieran penon kontraŭŝatan, ne eblos venki laŭplane.

Se memstara, strikte persone-individua agado ne ĉiam estas dezirinda, ĝi jes ricevos sian plenan valoron se ĝi okazas kadre de organizita agad-plano. Je tio memkompreneble oni devas kalkuli je la aliaj kaj sin direkti al la ĝeneralaj reguloj. Tio havas cetere siajn avantaĝojn, nome, ke vi ne persone devas respondeci pri aferoj kiujn vi plenumas, sed estos protektata de la movado kadre de ĝia movada programo.

Mallonge : bonvolu fidi al la (cetere de vi mem elektita) estraro kaj sekvi ĝin en sia laborado. Tio etas la nura certa asekuro rilate al ebla sukceso.

Se tamen vi ne kontentas pri ĝi, certe ne silentu, sed diru sentime vian opinion, "rekte kontraŭ la rapo".

Pri via sincero kaj fido kore dankas

la estraro.

## A L V O K O J

### GAZETARA SERVO

Vi jam scias ke finfine FEL sukcesis starigi taŭgan gazetaran servon. Ĝin prizorgas Annie BOLLAERT kaj Herman DECEUNINCK.

Kompreneble por ke la servo bone funkciu, estos necesa granda kvanto da kunlaborantoj ĉie en la lando.

Por kion fari ?

- por disvastigi lokajn novajojn en formo de komunikoj.
- por esplori gazetojn kaj rekolti artikolojn por ilin ensendi
- por reagi al aperintaj artikoloj
- por estigi kontaktojn kun redakcioj
- ktp. ktp...

Pliajn informojn vi ricevos, post anoncado de via interesiĝo, de Annie BOLLAERT, Zomerstraat 16, 1500 HALLE
Tel. - dumdejore (normalaj oficaj horoj) : 02/513 79 40
privately (vespere) : 02/536 76 50

------------

### ESPERANTO KONGRESO 1983

En la kunsid-protokoloj vi legos ke landa kongres(et)o estos organizita en Leuven dum la semajnfino de la 10-a kaj 11-a de septembro 1983.

Tia kongreso kompreneble kaŭzos multe da laboro, tro por nur kelkaj personoj. La organizantoj do nepre bezonas helpon de kiel eble plej multe da personoj.

Ĉu vi havas iom da tempo libera kaj ĉu vi pretas dediĉi ĝin al la kongres-organiz-laboroj ? Bonvolu tiam anonci vin al

ESPERANTO 2000, Duisburgsestraat 12, 3030 LEUVEN/HEVERLEE, tel 016/20 14 53.

Dankon.

------------

## K O M U N I K O J

### Aalst.

Sabaton la 20-an de novembro la Aalsta grupo "La Pioniro" organizis tuttagan ekskurson al la Altmarĉejo, sub gvidado de Katja Lödör.

Partoprenis ankaŭ membroj de la Antverpena VERDA STELO.



Pri ĝia jes aŭ ne sukceso ni (bedaŭrinde) aŭdis nenian eĥon.

------------

### KALMTHOUT - LA ERIKEJO

Jaŭdon 16-an de decembro 1982 : komuna vespermanĝo (ĉiujara) en la salono VANLOON, Dorpsstraat 68 en Kalmthout.

Festprelegos dr. Wim De Smet pri "Retrorigardo al 25 jaroj en la Esperanto Movado.

----------

Pro malfrua alsendo, la januara/februara programo de LA ERIKEJO ne povos aperi en ESPERANTO PANORAMA.

Jen gia ĉefaj partoj :

- Jaŭdon 27 01 1983 : W. De Smet prelegos pri la "Kontribuoj de Belgio al la progreso de la zoologio".
- sabaton 25 02 1983 : Tago de la Internacia Amikeco,
  La vespera programo estos organizita de FLEJA.

-----------

### MORTSEL

La dimanĉmatenaj kunven-programoj iĝas pli kaj pli interesaj kaj diversaj. Plie, ili kompletigas fakte la kunveneblecoj de LA VERDA STELO, ĉar ja tiuj personoj kiuj ne povas iri al la vendred-vesperaj programoj en Antverpeno povas malgraŭ tio renkonti amikojn kaj praktiki la lingvon. Sufiĉe regule vizitas la kunvenojn eksterlandaj gastoj.

Ĉiu bonvenas.

---------

### LIBROSERVO SONORILO

Okaze de ĝia 20-jara ekzisto, la Eldonejo/Librejo SONORILO regalos vin pro la Kirstnaska-kaj Novjara festoj je 5% rabato por la sekvaj libroj :

- Ĉu vi vidis jam la piedsignon de la profeto
- Esperanto snel assimileren
- Esperanto, une approche de la langue internationale
- Historio de Esperanto

- Initiation théorique et pratique
- Konsideroj
- Kristnaska Triptiko
- Leksikono de J.P. Bovy
- Moderna Kroatia prozo
- Poezia bukedo por geknaboj de la mondo
- Verda raketo

Mendu ĉe ELDONEJO LIBEREJO SONORILO, Doornstraat 22, B-2610 WILRIJK.

----------------

## I D E - K E S T O

### Rilate al "Ide-kesto"

En la novembra "INFORMILO" mi atente legis la artikolon de "Josuperter" pri "La movado kaj ni" kaj, malllonge, mi ŝatus diri ke :

1. urĝegis organizi eksteran agadon, kiu estis antaŭe terure malzorgita ;
2. nepre kaj samtempe ni okupiĝu pri la membraro, kies granda parto restas forgesata, t.e. tiu, kiu deziras uzi Esperanton fakcele ;
3. se la interna agado estis tiom efika, mi ne bone komprenas kial en la plimulto de niaj urboj la Esperanto-klubanaro veteraniĝis kaj ne kapablis allogi pli da novaj fortoj ;
4. estas tro facile jam nun kritiki la novan strategion de UEA kaj de FEL, ĉar estas nur post du, tri jaroj ke ni povos objektive prijuĝi ĝin.

Estas fakto ke novaj ideoj malkontentigas tiujn, kiuj ĉiam rutine agadis, kvankam mi konsentas kun tiu sennoma samideano, keni ne peku per ekstremismo en iu ajn direkto. Male, ni zorgeme atentu pri tiuj kvar nedisigeblaj punktoj :

1. bone informiĝi i.a. dum tiuj studotagoj, kiuj estas bonegaj iniciatoj ;
2. plane informi t.e. la ekstera agado, kiu ĝis nun apenaŭ ekzistis ;
3. serioze instrui, ankaŭ nun la Esperanto-instruado estas ĉefe amatora kaj kiu ajn rajtas fariĝi Esperanto-instruisto ;
4. utile uzi Esperanton, ne nur por klubi kaj kongresi "inter si", ne nur por hobiaj celoj, sed ankoraŭ por fakaj, sciencaj, profesiaj celoj. Tiun ĉi punkton la Esperanto-kluboj ĝenerale neglektas kaj pro tio forigas nem grandan nombron de Esperanto-lernantoj.

Germain Pirlot.

-----------



## S E N T E M O J (el "Taalbeheersing in de Administratie" - W. Penninckx)

Lingvo estas grava - eble eĉ la plej grava - ero de kultura identeco de persono kaj de socio. Lingvo estas la kunligo inter homoj de unu sama vilaĝo, unu sama regiono, unu sama popolo. Kiu ekaŭdas kritikon pri la uzo de la propra lingvo, sentas sin ekskluzivigita el la socio, ĉar li ne uzas la komunikilon de la grupo laŭ korekta maniero.

Flandroj tia kritiko des pli trafas, ĉar ili devis longe kaj pene batali por konkeri tiun lingvoidentecon kaj, do, komprenebIe estas ke, je tiu punkto, ili estas ankoraŭ pli sentemaj ol aliaj por kiuj la posedo kaj uzo de propra lingvo formas neniam kontestitan atingaĵon.

Por la socilingvistiko cetere estas interesa demando kiel kaj kial lingvo, kiu en Flandrio pro tri-jarcenta okupado estis komplete forpuŝita kaj pluvivis nur ankoraŭ en dialektoj, sukcesis sin restarigi kaj iĝi denove la kulturlingvo de popolkomunumo.

La obstina batalo kiun la Flandroj devis plenumi tamen faris vundojn kaj postlasis cikatrojn kiuj klarigas, tiel la fieron de la Flandroj pri sia lingvo, kiel ilia sinteno pro kritiko rilate al sia uzo.

(tradukis JB)

-------------------

## LASTMOMENTAJ KOMUNIKOJ

Niaj komisiitinoj pri "Intergrupa Agado" - dr. Trees DOOMS kaj dr. Hilde Van Ingelgem - intencas fari enketon rilate al la eblecoj pri estonta intergrupa kaj eĉ interregiona agado.

Verŝajne ili proponos al FEL-estraro denove okazigi siajn kunsidojn en diversaj lokoj, kiel tio jam okazis antaŭ kelkaj jaroj. Ekzemple laŭvice en la diversaj provincoj.

Ili kunmetos formularon plenigotan de la grupestroj kaj per kiuj ili petos kunlaboron en formo de ideoj, sugestoj ktp.

Jam nun sugestoj estas bonvenaj.

---------

ILEF (Internacia Ligo de Esperantista Foto-, Kino-, Magnetofon-Amatoroj) kaj TEĴA (Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio) serĉas kandidatojn por sia estraro kiu estos (re)elektita okaze de la venonta UK en Budapeŝto.
Info : ILEF, Hristo Botev 97, BG-1303 SOFIO, Bulgario.

------------------

# VLAAMSE ESPERANTOBOND
# FLANDRA ESPERANTO-LIGO

## KADROKURSOJ 1982-1983

| | | | |
|---|---|---|---|
| Sabaton 23 10 1982 | 09.00 - 10.00 h. | mallonga ekzameneto pri lingvokono | |
| | 10.00 - 16.00 h. | PAROLTEKNIKOJ fare de Paul Peeraerts<br>Publikaj paroladoj | |
| " 27 11 1982 | 09.00 - 10.00 h. | ekzameneto (se necese) | |
| | 10.00 - 16.00 h. | LITERATURO | Christian Declerck |
| " 18 12 1982 | 09.00 - 10.00 h. | ekz. se necese | |
| | 10.00 - 16.00 h. | INSTRUTEKNIKOJ | Emiel Van Damme |
| " 22 01 1983 | 09.00 - 10.00 h. | ekz. se necese | |
| | 10.00 - 16.00 h. | KUNVEN- kaj<br>DEBAT-TEKNIKOJ | Paul Peeraerts |
| Ø " 05 03 1983 | 09.00 - 10.00 h. | ekz. se necese | |
| | 10.00 - 16.00 h. | HISTORIO | Fernand Roose |
| " 26 03 1983 | 09.00 - 10.00 h. | ekz. se necese | |
| | 10.00 - 16.00 h. | KOMUNIKADO<br>Inform/propagand-teknikoj | Anne Tilmont |
| " 23 04 1983 | same kiel 26 03 1983 | | |

Ø Pro la Semajno de Internacia Amikeco, la kursoj ne povas okazi, nek je 19 02 1983, nek je 26 02 1983.

Por pliaj informoj : ESPERANTO-CENTRO, Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN
André STAES
Jan BOVENDEERD

La kursoj okazos en ESPERANTO kaj estas alireblaj al ĉiu.

# PROTOKOLO

PRI LA ESTRARKUNSIDO DE SABATO 11-A DE SEPTEMBRO EN ANTVERPENO

Ĉeestas : Edward Symoens, Jules Verstraeten, Petro De Smedt, Christian Declerck, Guido Shroeyers, Roger De Schepper, Hilde Van Ingelghem, Trees Dooms, Paul Peeraerts, Gerd Jacques, Jan Bovendeerd.

Petis senkulpigon : Fernand Roose, Willy Huybrechts, Kristin Tytgat, Ivo Durwael.

Kromaj invititoj : Erhard Boehme, Marc Van den Bempt, Wim De Smet

Prezidis : Edward Symoens

Protokolis : Jan Bovendeerd.

---

La hodiaŭa kunsido komplete dediĉiĝas al priekzameno de nia nuntempa situacio, tiel el financa kiel el movada vidpunktoj kaj al ellaboro de ampleksa laborplano, proponita de JB kaj jam skribe pritraktata de E. Symoens, R. De Schepper, I. Durwael kaj Marc Van den Bempt. Telefone reagis Gregoire Maertens.

1. FINANCOJ

1.1.1. Laŭ JB la Esperantocentro kostas al ni tro da mono pro laborhoroj de pagitaj oficistoj.
Li proponas reiri al la antaŭa situacio, je kiu ĉiu estrarano faris mem la administran laboron propran al sia tasko : ekz. la sekretario la korespondadon, la kasisto la librotenadon ktp. kaj poste reprikonsideri kun UEA la dividon de la kostoj.

1.1.2. GM, kiu antaŭe opiniis, ke JB troigis rilate al la financa situacio de FEL, nun agnoskas ke ni efektive troviĝas en ege necertaj cirkonstancoj

1.1.3. RDS konsideras la ŝituacion eĉ katastrofa.

1.1.4. ES opinias, ke se la situacio vere estas tiel grava kiel ĝi ŝajnas esti, ni devas fari radikalajn aranĝojn kaj, se la plej peza ŝarĝo efektive estas la E°-Centro, ni devas ŝanĝi niajn rilatojn al la Centro.

1.1.5. M VDB opinias, ke la movadaj laboroj estus faritaj senpage, sed ke la kostoj - ĉiuj kostoj - estu repagitaj.

1.2. Post priparolado kaj klarigadoj de PP, konstatiĝas ke :

1.2.1. la librotenado nun estas tiel kompleksa kaj interplekta (UEA / FEL) (ĉar la tuta librotenado de GCA (Grafika Centro Antverpena) trafluas la kontojn de FEL) ke oni nepre lasu ĝin al la E°-Centro.

1.2.2. ne estas klare kiom ekzakte reprezentas en laborhoroj la administra laboro (korespondado ktp.)

1.2.3. Tial decidiĝas ekde nun ĝis fino de la jaro, lasi al E°-Centro nur la rutinajn laborojn, dum ĉiuj korespondajoj por FEL estos simple transdonitaj al JB por plutraktado.

1.3. Samtempe PP klopodos fari analizon de ĉiuj kostoj kaj RDS faros kiel eble plej kompletan studon de la vera financa situacio

1.4. Dume nenio ŝanĝiĝos por la ekstera mondo. La adreso restos tiu de GCA por ĉio, kio koncernas Esperanton en Flandrio, ĉar ja la centraligo jam elmontris sian efikon.

1.5. Dum la diskutado oni sentas du esencajn mankojn :
- tiun de kompetenta, profesinivela librotenisto
- tiun de homo kiu vere funde konas la rilatojn UEA/FEL.

2. KOTIZOJ

PP proponas plialtigon, ĉar la nunaj enspezoj el la kotizoj ne sufiĉas eĉ jam por kovri la kostojn de ESPERANTO PANORAMA !

Li proponas jenon :

2.1.1. membrokotizo je BF 150,-, el kiu BF 50,- por la grupo kaj BF 100,- por FEL.
Rilate al FLEJA la divido povus esti : FEL : 50, FLEJA : 50, la grupoj : 50.

2.1.2. Plie, el la kotizoj de la Amikoj de Esperanto, la subtenantoj do,aŭ la nuraj abonantoj al la revuo ESPERANTO PANORAMA alportitaj de la grupoj, ni aljuĝu BF 20,- al la grupoj, dum BF 80,- restu al FEL.

2.1.3. Finfine la (jam de jaroj alpledataj de JB) apog-kartoj (steunkaarten) akceptiĝas. JB faros projekton por la venonta kunsido, prepare al ĝia eventuala presado.

2.2. FLEJA - kotizoj.

2.2.1. FLEJA volus denove enkorpigi KONCIZE en la kotizojn, ĉar se ne, la abonkvanto estas tro malalta.
Tial ili proponas kotison de BF 220,- inkluzivante la abonon al KONCIZE. Aparta abono kostus BF 150,-

2.2.2. Neniu estrarano favoras tiun ideon, PP ĉefe pro la troaltigo de la librotenadaj kostoj.

2.2.3. Se FLEJA tamen postulas la aplikon, FEL kompreneble akceptas, sed nur se FLEJA akceptas la alfakturadon de la kromaj kostoj.

2.2.4. GJ tiel raportos al la FLEJA-estraro.

3. TELEFONO.

PP konstatis lastatempe ke,ekzemple rilate al la novaj E°-kursoj, oni telefonis pli vespere ol dumtage. El tio elmontriĝas, ke homoj ofte telefonas vespere, ekster la oficejaj horoj. Li opinias, ke ni devas laŭeble respondi al tiuj alvokoj kaj, do, proponas enstali respondaparaton. La kostoj sumiĝus je ± BF 15.000,-. Ĉu la investo valoras la penon ? Post mallonga kalkulado,oni trovas ke la kostoj povas esti tre rapide regajnitaj en laborhoroj.
Ĉiu favoras la investON.



---

paŭzo de 13.00 ĝis 14.30 h.

---

4. TASKODIVIDO

Kompreneble, priparoli laborplanon sen antaŭa difino de niaj laborfortoj, ne havus multan sencon. Tial ni prikonsideru antaŭ ĉio la kunmeton de taŭga teamo el espereble kompetentaj kaj kunlaborpretaj personoj.

4.1.1. JB proponis sufiĉe radikalan reformon de la estraro, eĉ se necese, malatentante la statuton.
Li opinias, ke ni petu al la ĝenerala asembleo, senrezervan akcepton de la hodiaŭ kunmetota plifortigita estaro, se ne por la tuta kvinjara preparperiodo al la jubilea jaro 1987, almenaŭ por provperiodo, kiu permesos ankoraŭ ĝustatempe ŝanĝi ĝin se tio elmontriĝos necesa.

ES opinias, ke ni nepre distingu la kernestraron, la ĝeneralan estraron kaj la fakajn kunlaborantojn. Li proponas ke ni klopodu altiri reprezentanto(j)n de ĉiuj fakaj asocioj.

La fina celo estas alveni al jena situacio :
- kernestraro, kiu okupiĝas pri la vera estrado de la movado ;
- kadro, kiu konsistas el teamo de personoj kiuj priesploras la diversajn agadterenojn kaj donos al ni la necesajn konsilojn ktp.
- fakaj gvidprupoj por disvastigi Esperanton en la diversaj medioj de el kohera kaj forta movada kerno.

4.1.2. JB proponis jenan kunmeton :

- la nuna estraro, nome : E. Symoens - prez. k. Informado/Planado/Agado
R. De Schepper - revizoro / buĝeto
J. Verstraeten - konsilanto pri financoj
J. Bovendeerd - sekretario
P. Peeraerts - Direktoro de la E°-Centro Librotenado
K. Tytgat - Junularo

membroj : F. Roose
G. Schroeyers

- novaj estraranoj
E. Boehme - kasisto
P. De Smedt - organizado de grupoj/kernoj ktp
I. Durwael - gazetaro
T. Dooms

H. Van Ingelghem
M. Van den Bempt

ES. Proponas jenajn fakajn kunlaborantojn :
Willy Huybrechts - komputeraj aferoj
Wim De Smet : Sciencaj aferoj
Chr. Declerck : tradukaj aferoj
F. Roose : Literaturo.

4.2. 1. La priparolado elmontriĝas ke
- P. De Smedt ne povas aktive partopreni en la estraro, i.a. pro profesiaj kialoj, sed ke li volonte kunlaboros neligite.
- Same M. Van den Bempt.
- E. Boehme, ne ĉeestante, ĝis nun ne rifuzis sian partoprenon, sed ankaŭ ankoraŭ ne akceptis
- I. Durwael preferas ne alpreni laborkrean taskon, pro tio ke li jam havas tro da taskoj en rilato kun LA VERDA STELO kaj la Esperanto-domo. Tamen, li tre aktive partoprenas en la gazetara servo kaj li estas preta formi volontulan servon.

4.2.2. Post priparolado, kunmetiĝas jenan estraran teamon :

4.2.2.1. Kernestraro
E. Symoens : prezidanto + Informado/Planado/Agado
R. De Schepper : Vic-prez. - revizoro / buĝetoj
J. Verstraeten : konsilanto pri financoj
P. Peeraerts : Librotenato - Esperanto-Centro
J. Bovendeerd : sekretario
K. Tytgat : reprezentanto de FLEJA

4.2.2.2. Ĝenerala estraro
H. Van Ingelhem }
T. Dooms } - (re)organizado de lokaj grupoj/kernoj ktp.

al tiu ĉi komisiono aldoniĝas la jam ekzistantaj provincaj reprezentantoj :
G. Schroeyers : Limburgo
F. Roose : Okcident-Flandrio
M.Th. Henquinez : Brabanto
A. Staes : komisiito pri kadrokursoj
Chr. Deckerck : Literaturaj - tradukaj - eldonaj aferoj

4.2.2.3. Fakaj kunlaborantoj
W. Huybrechts : komputeraj aferoj
W. De Smet : sciencaj aferoj

4.2.2.4. Tiu ĉi listo estu laŭeble plikompletigota, dum ni kontaktiĝu E. Boehme por akcepti la kasistan (= ĉefe kontrolan) taskon.



5. UNUA LABORPROPONO

5.1. Konstatiĝas, ke ni fakte ne konas niajn verajn disponeblajn laborfortojn. Unua paŝo, do, estu :
- koni niajn membrojn, iliajn kapablojn, ilian sintenon al la movado ktp.

5.2. En sia propono JB instigas al kreado, apud la ekzistantaj grupoj, de perantoj kaj/aŭ kernoj ĉirkaŭ individuaj aktivuloj.

5.2.1. Per "perantoj" li celas personojn kiuj ekz. pretas unu fojon jare viziti ĉiujn eblajn - inkluzive de iamaj - membroj por konvinki ilin al re-aniĝo, sin bazante eventuale sur la alproksimiĝanta 100-jariĝa jubilejaro 1987.

5.2.2. Per kernoj li pensas pri perantoj kiuj pretas organizi ion en formo de grupo - sen ke pro tio estus necese krei grupon en la senco de la statuto, do, kun prezidanto, sekretario, kasisto ktp, - en komunumoj kie ne estas grupo.

5.3. Unua paŝo en la kvinjara preparperiodo al la 100-jariĝo estu do :

5.3.1. Proponi al ĉiuj grupestroj liveri al ni, konfidence kompreneble, kiel eble plej kompletan liston de sia membraro kun maksimumo de informoj.

5.3.2. Peti al grupoj komisii peranton por la altiro de novaj membroj kaj la eventuala enkasigo de la kotizojn ĉe ne-repagintoj.

5.3.3. Trovi peranton tie, kie ne ekzistas grupo.

5.4. La estraranoj mem jam faros liston de valoraj personoj de ili konataj, jes aŭ ne esperantistoj, sed favoraj al la ideo Esperanto.

5.5. Intertempe la komisiono pri grupa agado priesploras la terenon rilate al pli-bonigo kaj pli-aktivigo de la grupa vivo.

5.6. Kun tiu ĉi laborplano, la estraro aperu antaŭ le ĝenerala asembleo por aprobo kaj realigo.

6. ELDONOJ

Ni ĉesigos provizore la eldonadon, ĉar la operacio ne alportis la esperitan rezultaton.. Ja ekestis malfacilaĵoj rilate al la vendado, kiuj devas esti solvitaj tut-antaŭe.

7. ORGANIZO DE ESPERANTO-CENTRO

La organigramo restos senŝanĝa ĝis fino de novembro. Tiam finiĝos la BTK-kontrakto. Kiel estos la situacio ekde decembro, ankoraŭ restas demando-signo.

Je 01 12 1982 foriros 7 kunlaborantoj, 6 BTK-anoj kaj 1 militrifuzanto. Ni verŝajne ricevos same multe da novaj kunlaborontoj, sed ĉu ili estos la samaj kiel nun, tute ne estas certe.

8 PLUA LABORPLANO

8.1. Ni trovu monrimedojn el ĉiuj eblaj fontoj, eventuale vendonte facile aĉetotajn objektojn ĉiuspecajn.

8.2. Esperanto-Centro povus ekzemple reklami kaj presi belaj nomkartoj k.s.

8.3. Ni klopodu kunmeti specialan komisionon kiu okupiĝu nur pri la esplorado de komercaj eblecoj.

8.4. Daŭre kaj daŭre pripensi ĉiujn eblajn plibonigojn, pliaktivigojn de la grupoj ktp.

9. KADROKURSOJ

FEL reorganizos la pasintjaran serion de kadrokursoj, kun tiu ĉi eta diferenco ke, se jes oni devos pruvi sian lingvokonon kadre de mallonga buŝa ekzameno komence de la kurso-tago, oni nun libere povas elekti la eron kiu pleje interesas al si.

Kompreneble, nia laborplano kaj restrukturigo de la movado havos seriozajn ŝancojn nur se al la kadrokursoj partoprenu sufiĉe da personoj. Normale la diversaj grupoj devus delegi almenaŭ unu personon al tiuj kursoj.

André STAES (sociologo) estonte - post la neevitebla alirperiodo - okupiĝos pri tiuj kursoj. Li pristudos la eblecojn pri plikompletigo, pliperfektigo, plivalorigo de la kursoj.

10. KUNSIDOJ

10.1. JB proponas anstataŭi la administrajn kunsidojn per ĝeneralaj, sed ne tro ofte kunvoki ilin, kondiĉe ke ĉiu estu sufiĉe bone informita pere de INFORMILO.

10.2. Tamen, ni ne povas forgesi la necesajn kontaktojn kaj tial li ege favoras la ideon de kongresoj.

10.3. Ke li ne estas sola en tio, pruvas ke Marc Van den Bempt el Leuven jam sin deklaris preta organizi FEL-kongreson, kompreneble en Leuven kaj ekster la akademia jaro, do, de julio ĝis septembro.
Bonega iniciato kiu, bedaŭrinde, ne plu estos ebla ĉi-jare.
Sed, kial ne en 1983 ?

Fino je 19.00 h.

JB.

-----------------------



# FLEJA

## PROTOKOLO PRI LA ESTRARKUNSIDO DE 26 08 1982 EN ANTVERPENO

Ĉeestas : Kiki, Wim kaj Ite TYTGAT, Gerd kaj Ilse JACQUES, J.P.VANDENDAELE kaj Jan ERREYGERS.

Komenciĝo : 10.30 h.

## TAGORDO

1. FINANCOJ

- Librostando (Ite)
  la vendado de libroj, T-ĉemizoj kaj swaetshirts estis gajnprofita.
  Ite subskribos unujaran kontrakton prove por aĉeti librojn de Literatura Foiro (La Chaux-de-Fonds)
- Koncize
  La fakturoj nepagitaj estos pagitaj.
  Propono por FEL-aliĝilo jene :
  3 kotizoj : 1.1. Membreco (ĉefmembro, ricevonta senpage ESPERANTO PANORAMA + la junuloj krome JEN) X 100 BF
  1.2. Membreco (ĉefmembro + E°-PANORAMA, + junuloj JEN kaj KONCIZE) X 220 BF
  1.3. Abono al KONCIZE X 150 BF
  Tiu ĉi propono estos prezentata dum sekvonta FEL-kunsido, se tio administrative ankoraŭ eblas.
- IJK (Jan)
  Estos LKK-kunsido en Leuven (oktobre) kun kelkaj FLEJA-estraranoj.

2. BUĜETO

La buĝeto por 1983 estos kompilita antaŭ septembro por FEL.

3. JEN

Por prepari unu numeron de JEN necesas 23 laborhoroj. Por ĉi tiu laboro FLEJA ne pagas, sed Gerd kromlaboras por kompensi. Volontuloj povus ankaŭ kunlabori en GCA (Grafika Centro) por regajni tiujn ĉi horojn.
Elmontriĝas ke multe da artikoloj en JEN estas verkitaj de Nederlandanoj.
Ni ŝatus demandi al tiuj, kiuj havas interesan artikolon, sendi sian kontribuaĵon al JEN.

4. LICHTAART 1982

Aliĝilo kaj subvenciopeto estas faritaj, la programo plene aranĝota.
Por kursoj bezoniĝas ankoraŭ gvidantoj.

5. BORSOJ

"Boekenbeurs" ne plu okazos pro malfondiĝo de la koncerna asocio.
Borso "De Rode Vaan" (Ruĝa Flago) je 11 - 12 09 en Bruselo.
Ĉar estos budo, ni serĉas la necesajn personojn. Ilse kaj JP (se necese) volas iri tien. Ili mem pagos la enirbileton. La repago de la vojaĝkostoj okazos laŭ la regulo menciita en la protokolo de 22 08 1981.

6. DIVERSAĴOJ

- Flandra Junularasocio (Vlaamse Jeugdraad) enhavas interalie sendependan laborgrupon por internaciaj rilatoj de flandraj junularaj asocioj. Kiki redaktos leteron por scii la aliĝkondiĉojn.
- SONORILO
  Por solvi la ĉiamajn problemojn, okazos kunvenon inter FEL, FLEJA, GCA kaj SONORILO.
- Faldfolioj de junulargastejoj
  Esploro de nombro de junulargastejoj flandraj por scii la bezonatan nombron de faldfolioj. Decido pri aĉeto de NEJ sekvos.

Fino : 23.15 h. Protokolis : J.P. VANDENDAELE.

-----------------------

# P R O T O K O L O

PRI LA ĜENERALA KUNSIDO DE SABATO 16-A DE OKTOBRO 1982 EN ANTVERPENO.

Ĉeestis : por la estraro : Roger De Schepper (RDS), Jules Verstraeten (JV)
Paul Peeraerts (PP) kaj Jan Bovendeerd (JB)
petis senkulpigon Edward Symoens.(ES)

el la grupoj :

| | |
|---|---|
| Antwerpen | Ivo Durwael, André Staes? Patrick Boet |
| Beringen | Guido Schroeyers |
| Brugge | Gregoire Maertens? Fernand Roose |
| Deurne | Frans Luyten |
| Gent (Progreso) | Arpad Lödör |
| Klubo) | Maria Lycke, Adhemar Van de Velde |
| Halle-Buizigen | Annie Bollaert kaj Herman Deceuninck |
| Hasselt | Albert Claesen |
| Kalmthout | Wim De Smet |
| Kortrijk | Cesar Vanbiervliet k. Jan Hanssens |
| Leuven | Marie Thérèse Henquinez |
| | Marc Van den Bempt k. Herman Van Eynde |
| Tessenderlo | Alfons Beckers |

petis senkulpigon : A. Marmenout el Blankenberge.

Komenciĝo : 14.15 h.

Kvankam pro la malĉeesto de la prezidanto, normale gvidu la kunvenon la vic-prezidanto, estis interkonsentite inter ES kaj JB, ke tiu ĉi gvidu ĝin, ĉar ja la hodiaŭa laborprogramo estis kunmetita de ili du. Cetere, la vic-prezidanto (RDS) kiu, laŭ siaj diroj, ankoraŭ ne tute refortiĝis de la kongresaj laboroj, preferis ne gvidi la kunvenon.
La kunvenintoj akceptas kaj, do,

- gvidas la kunvenon : JB
- protokolas : JB

Rilate al la relativa malmultnombra partoprenantaro, W. De Smet malkontentas pro nesufiĉe ĝenerala invitado.
JB - respondeculo pri la invitado - replikas, ke la invitado okazis kiel ĉiam antaŭe, nome pere de la grupestroj.
WDS agnoskas ke li, en sia grupo, ne informiĝis pri tio, nek pri eventuala partopreno de aliaj membroj el sia grupo.
Tamen, se JB opiniis ke la invito al la ĝenerala kunsido estis lanĉita ankaŭ pere de ESPERANTO PANORAMA, evidentiĝas ke tio ĉi lasta ne veras.

Kiel ajn, la ĉeestantantaro ne estas multe pli malalta ol en antaŭaj ĝeneralaj kunvenoj.

Ĝuste pro tiuj malgrandnombraj partoprenoj en ĝeneralaj kunsidoj, JB jam sin demandis plurfoje ĉu ĉe la membraro ekzistas ja sufiĉe da fido en la estraro kaj ĝiaj laboroj, ĉu la estraro ja sukcesis meriti tian fidon, ĉu la estraro ja sukcesis interesigi la ĝeneralan membraron, ĉu ne tempo estus repripensi la taŭgecon kaj la kompetenton de la nuna estraro. Tial cetere la hodiaŭa kunsido.

1. ENKONDUKO

JB atentigas pri la 100-jariĝo de Esperanto en 1987 kaj pri la speciala aga programo de UEA cele al deca festado de la jubileo. Ke FEL volas kunlabori tiu speciala plano ja estas memkompreneble. Cetere, la plano kiun faris UEA por proponi internaciskale al siaj landaj asocioj, plej grandparte estas ellaborita de nia prezidanto Edw. Symoens.

Kompreneble tiu plano direktiĝas al la superaj tavoloj de la socio. Ke ni ne ĉiuj povas aktive labori sur tiu nivelo, ne estas malfacile akcepteble. Sed ni jes povas helpi kaj zorgi ke la movado bone funkciu ĉe la bazo. La bazo estas ni ĉiuj, la grupoj, la enlandaj organizoj. Jen kie kuŝas nia agadtereno. Se tiu ĉe-baza agado ne estas forte strukturita kaj ne bone funkcias, la laboro farita sur pli supera nivelo ankaŭ ne havas sencon.

JB skizas la nunan situacion de la movado el struktura vidpunkto kaj komparas ĝin kun ... normala entrepreno.

Laŭ li, en normale funkcianta entrepreno aŭ movado, nemalhaveblas tri - eĉ kvar - elementoj :

- decidantoj = estraro
- kadro : esplorantoj-konsilantoj = komisiitoj kaj fakaj kunlaborantoj
  gvidantoj-reprezentantoj-grupestroj
- plenumantoj = membroj

Li konstatas ke ĝis nun en nia movado ekzistis fakte estraro kaj membroj = kapo kaj piedoj, ligitaj inter si per nerigida ŝnureto = la administrantoj/reprezentantoj.

La hodiaŭa kunsido decidu unue pri la de la estraro proponita plifortigita, plilarĝigita estraro (kadro, fakte) kaj pri agadprogramo pri kiu temos pli detale en la sinsenkvo de la tagordo. En la realo, la diferencaj punktoj de la tagorodo fakte interplektiĝas kaj devus esti pritraktataj ĉiuj kunaj,sed ordo devas esti.

Antaŭ ol daŭrigi, li proponas aŭskulti la raportadon de la financa komisiono kaj



iom debati pri la ĝenerala situacio.

1.2. RDS tre detale klarigas la buĝeton kaj konstatas ke la venontjara buĝetita deficito sumiĝos je BF 186.380,-
Jes, ke la deficito malpliiĝis de ± 300.000,- BF al 186.000,- F pruvas ke oni sukcesis limigi siajn elspezojn per ĉiuj eblaj rimedoj, ne signifas ke 186.000,- BF ne estus terure granda sumo kaj reprezentas grandan truon plenigendan!

1.3. PP proponas kelkajn rimedojn al tio, inter aliaj :
- plialtigi la kozitojn (vd sub 2)
- sur grupa nivelo : disvendi niajn eldonitaĵojn (ĝis nun LA AVENTUROJ DE ŜPAR- KAJ ALIA PORKOJ de Rik de Roover, ESPERANTO KION MI POVAS FARI PER TIO kaj ESPERANTO WAT KAN DAARMEE DOEN) kontraŭ makleraĵo de ekz. 20 %)

  varbi abonojn al ESPERANTO PANORAMA, ankaŭ kontraŭ maklerajo.

  vendi subten-kartojn, same kontraŭ maklerajo

1.4. Bona novaĵo estas, ke la kontrakto UEA/FEL estas reviziita kaj ke estonte FEL ne plu devos pagi fiksan parton de la salajraj kostoj, sed estos fakturita por la reale por FEL laboritaj horoj.
Ankaŭ ĉi tie estos eble retrovi monon, farante kiel eble plej multe da laboro fare de volontuloj. Tio ja permesus limigi la kostojn al la veraj materialaj kostoj.

1.5. Alia ebleco por ekvilibrigi la buĝeton estus disdividi la deficiton inter ĉiuj membroj, kio signifus ke ĉiu pagu ± BF 400,-. Tia propono tamen ne estas pensebla.

1.5. Ĉi tie intervenas Gregoire Maertens, kiu revenas de ĝenerala kunsido de la administrantaro de Eldonejo SONORILO. Li raportas :
- SONORILO originas el la kunmeto de la du tiamaj societoj FLANDRA ESPERANTO INSTITUTO kaj REĜA BELGA KOOPERATIVO. Decidiĝis ne reiri al la antaŭa situacio, kiel okazis ekzemple sur movada nivelo, sed lasi SONORILO-n nura tutlanda libroservo (kun eventuala aparta kontrakto kun FLEJA, kiu ne partoprenas en la administrantaro de SONORILO)

  El la bilanco de SONORILO elmontriĝis ke 1981 donis profiton de BF 100.000,-. El tiu profito SONORILO tuj pagos al FEL BF 20.000,-, al APE same BF 20.000,- kaj al BEF 5.000,-. Kial same multe al FEL kaj al APE ? Ĉar, kvankam FEL havas pli da membroj, APE aĉetis proporcie pli da libroj.

Aliflanke, ĉiuj inform- kaj reklamiloj de SONORILO iru tra GCA(Grafika Centro Antverpeni), ĉefe rilate al prezentado, lingva kvalito ktp.

Plie eblos membriĝi al SONORILO pere de unufoja-por-la-vivo kotizo de BF 1.000,- post akcepto de la administrantaro.

1.6. El tio sekvas ke jam envenos F. 20.000,- por malpliigi nian deficiton.

1.7. En nia buĝeto ankoraŭ ne aperas la rentumo el la deponitaj sumoj.

2. KOTIZOJ

2.1.1. La estraro proponis pli altigon de 100 al 150, el kio 1/3 iru al la grupoj, dum 2/3 restu al FEL (vidu la protokolon de la estrarkunsid[illegible] de 11 09 1982)

2.1.2. Tamen, io pri kio ni ne devis kalkuli antaŭe estas, ke la ŝtato devigas nin pagi AVI-on (BTW) sur la kotizoj, jam sur tiuj de 1982. El tio sekvas, ke el la 50 F. kiujn ricevis FEL por 1982, restis nur 28 F. por pagi kaj la administrajn kostojn kaj ESPERANTO PANORAMA, kiu kostas 80,-F jare !
Do se ankaŭ nun FEL devos preni je siaj kostoj la kompletan AVI-on, restos al ĝi fakte nur 78,- F. por kovri ĉiujn kostojn.

2.1.3. F. Roose demandas kial ne plialtigi la kotizojn al 200,- F. ?
Kelkaj aprobas, aliaj kontraŭstaras dum triaj proponas apliki la plialtigon en du paŝoj, nome 150,- por 1983 kaj 200,- por 1984.

2.1.4. Voĉdonado elmontras, ke 11 kontraŭ 10 favoras tujan plialtigon al 200,- sed kun tiu kondiĉo, ke FEL portu la kompletan AVI-sumon.

2.1.5. La kotizoj por 1983 estos do 200,- F.

2.2.1. PP proponas plikompletigitan aliĝ- kaj abon-ilon, kun interesaj informoj. Per tiu sama formularo eblos ankaŭ mendi niajn proprajn eldonitaĵojn, kontraŭ 20 % makleraĵo por la grupo, se la mendo veno[illegible] tra la grupo aŭ almenaŭ kune kun aliĝo al FEL.

2.2.2. La perado de revuoj estos limigitaj al, krom la UEA-revuoj, HEROLDO DE ESPERANTO kaj MONATO.
Tamen, ĉar tio ĉi ĝis nun ne alportis ian maklerajon, decidiĝas ke tio estu priekzamenata kadre de estrarkunsido.

3. ESTRARO PLI KOMPLETIGITA/OTA

3.1. La propono senrezerve akcepti la hodiaŭ prezentota plifortigita estraro por la tuj-estonta kvinjara preparperiodo de la jubilejaro, estas ne aprobita. Proponiĝas anstataŭe jenon :

3.2.1. Ni lasu kiel antaŭe la tielnomitan kern-estraron, kiu laboru kun komisiitoj/komisionoj/fakaj kunlabantoj.

3.2.2. Tiel eblos, ne nur resti en la limoj de la statuto, sed ankaŭ posta[illegible] eventualajn ŝanĝojn pro neatenditaj cirkonstancoj.

3.3. Ekde nun do funkcios jena estraro kaj kunlaborantoj :

3.3.1. KERNESTRARO

Edward SYMOENS, prezidanto, respondeca pri Informado/Planado/Agado
Roger DE SCHEPPER, vic-prezidanto + revizoro/buĝetado
Jules VERSTRAETEN, konsilanto pri financoj
Paul PEERAERTS, direktoro de la E°-Centro + librotenado
Jan BOVENDEERD, sekretario + kunordigado
Kristin TYTGAT, reprezentanto de FLEJA

3.3.2. KOMISIITOJ/-ONOJ

Hilde VAN INGELGHEM kaj } (re)organizado de lokaj grupoj/kernoj
Trees DOOMS } intergrupa agado - komunikado
- en tiu ĉi komisiono kunlaboros la provincaj reprezentantoj :
Fernand ROOSE por Okcident-Flandrio
Marie Thérèse HENQUINEZ por Brabanto
Guido SCHROEYERS por Limburgo

Andre STAES - komisiito pri kadrokursoj

Christian DECLERCK - literaturaj, tradukaj, eldonaj aferoj

Annie BOLLAERTS kaj Herman DECEUNINCK - gazetara servo

Ivo DURWAEL - volontula servo.

3.3.3. FAKAJ KUNLABORANTOJ

Wim DE SMET - sciencoj
Willy HUYBRECHTS - komputeraj aferoj

3.4. Tiu ĉi listo ne estas kompleta. Ĝi estas laŭeble kompletigota.
Mankas ekzemple komisionoj pri :

3.4.1. Turismo
Turismo nome ne signifas nur de temp'al tempo organizi vojaĝon de unu lando al alia eventuale por sia persona plezuro. La tereno kompr[illegible] eble estas multege pli vasta kaj cetere multe tro peza por nur unu persono.

3.4.2. Kulturo
Kulturo ne signifas nur literaturo. Ĝi entenas ĉiujn eblajn kultura[illegible] aktivecojn, eĉ sporto k.s.
Kulturo povas malfermi pordon al "enpenetra" propagando, al "infiltr[illegible]
Devas esti eble organizi kadre de aliaj organizaĵoj, tiel ke nia nu[illegible]

organiza laboro koncernas nur partoprenon en alies programo.
Ekz. se okazas ie internacia muzikfestivalo, povus esti organizita partopreno de iu grupo, kiu tien iru, ne kun flagoj, sloganoj ktp. sed praktiku inter si la lingvon kaj respondu al demandoj faritaj.
Tio signifas rektan propagandon al interesitaj personoj.

4. AGADPROGRAMO

4.1. Fina celo, de sube supren :

4.1.1. ĉe la bazo : - kiel eble plej larĝskale pligrandigi nian membronombron, i.a. reanigante/retrovante ĉiujn eblajn iamajn membrojn

enpenetri kiel eble plej multe da (kulturaj) organizoj pere de adekvata organizado

plibonigi, plilarĝigi nian propran kulturan agadon

ekkoni niajn homojn, niajn laborfortojn, niajn eblecojn

4.1.2. kadre : formigi kompetentajn elementojn por okupi ilin en gvidaj postenoj por esplori, indiki, konsili la decidontan estraron

4.1.3. fake : enpenetri ĉiujn eblajn fakajn organizojn pere de taŭga kunlaboro/propagando

4.1.4. estrare : kunordigi, financi, gvidi.

4.2. Realigo, de supre malsupren :

4.2.1. estrare : ĝenerale : pripensi financeblecojn
" agad-direktojn
kunigi ideojn
ellabori planojn
kunordigi
gvidi
formi kadron pere de kadrokursoj

4.2.1. kadre : sur specifa tereno organizi programrealigojn priesplori, plikompletigi, pliperfektigi, konsili

4.2.3. ĉe la bazo (membraro) : organizi lingvokursojn pere/helpe de kadromembroj
kunlabori kun la kadro laŭ eblo kaj intereso
(re)trovi (mal)novajn membrojn
propagandi, sed organizite, kadre de agadsektoroj kaj laŭ indikoj de la kadro/estraro

4.2.4. ĉiuj kune kunlabori en la ĝenerala, mondskala kampanjo de UEA.



4.3. Tuja agado

4.3.1. Kunmeti taŭgan estraron, konsistanta el :
- kernstraro (decidonta)
- kadro -(esploronta - konsilonta)
komsiitoj
fakkunlaborantoj

Tio ĉi, kiel aperas pli supre, jam realiĝis.

4.3.2. Interesigi la lokajn grupojn/kernojn, formi taŭgajn gvidantojn pere de :

4.3.3. Kadrokursoj : Normale estas, ke ĉiuj movadaj ŝarĝoj ne ripozu sur nur kelkaj ŝultroj. Same normale estas malfermi la vojon al pliperfektigo kaj al formado de aktivuloj.
Tial la estraro insiste petas al ĉiuj grupestroj sendi almenaŭ unu personon el la grupo al la kadrokursoj, kiuj komenciĝos sabaton 23 10 82 kaj okazos laŭ la programo kiu troviĝos ekde nun en ĉiu numero de INFORMILO kaj de ESPERANTO PANORAMA.

4.3.4. Prepari la terenon al ĝenerala agado pere de :
- stàrigo de lingvo-kursoj
- kreado de novaj kernoj/grupoj
Rilate al tio ĉi, estas la intenco plikompletigi la kadrokursoserion per studotago pri la tekniko (?) de starigo de kursorondoj kaj kernoj.

4.3.5. Organizi kongresojn, por ebligi la necesajn kontaktojn.
Ĝoja novaĵo : por 1983 jam pretas organizi FEL-kongreson, verŝajne en septembro, ESPERANTO 2000 el Leuven.

4.4. Tuj-tuja agado

4.4.1. Por helpi en la kunmeto de sliparo rilate al niaj laborfortoj, la grupoj estas petataj komuniki konfidence kaj pere de specialaj formularoj kiujn ili ricevos post nelonge, la nomon kaj adreson, aĝon, profesion, funkcion en la E°-movado, lingvokonon, studojn, eventualan kunkaborpretecon de siaj membroj.

Kompletigi tiujn listojn per la samaj informoj pri novaj aŭ realiĝintaj membroj

4.4.2. Speciala peto direktiĝas al la grupestroj :
- komisii iu(j)n persono(j)n viziti la ne-kotiz-renovigintaj membroj kaj malnovajn membrojn por konvinki ilin al reaniĝo
- priekzameni antaŭajn membrolistojn por retrovi iamajn (ne plu) membrojn.

4.5. La sekretario ankaŭ proponas projekton de AKTIVEC-RAPORTO destinita al la grupoj, cele al plenigado por ĉiu unuopa aktiveco kaj al ensendado ĉiun

trian monaton (vidu ekzemplon en p. 7 de INFORMILO)
La projekto unuanime akceptiĝas kaj la sekretario estas komisiita se necese memorigi la aferon al tiuj grupoj, kiuj ne plenumis tiun taskon.

5. DIVERSAĴOJ

W. De Smet anoncas ke la eldonejo DE NEDERLANDEN partoprenos la libroborson en Bouwcentrum de 30.10 - 11.11.1982 kaj ekspozicios ankaŭ lian libron ESPERANTO SNEL ASSIMILEREN.
La 31-an de oktobro je 16.30 h. li estos intervjuita de BRT.

Vizitontaj je tiu momento prefere ne tuj iru al li por saluti, sed faru kvazaŭ ili ne konas lin kaj petu de li informojn pri Esperanto.

Fino de la kunsido : 17.00 h.

JB

------------------

# PROTOKOLOJ

STUDOTAGO DE SABATO 4-A DE DECEMBRO 1982 EN ESPERANTODOMO, ANTVERPENO

TEMO : GAZETARA REBATSERVO, KIEL ARGUMENTI/KONTRAŬARGUMENTI.

Partoprenantoj : (alfabete)
Annie BOLLAERT, Jan BOVENDEERD, Albert CLAESEN, Herman DECEUNINCK, Petro DE SMEDT, Ivo DURWAEL, Germain PIRLOT, Guido SCHROEYERS, André STAES, Herman VAN EYNDT

Gvidas : Petro DE SMEDT

Komenco : 14.15 h.

PDS proponas jenan tagordon :

1. Informado ĝenerale (Andre STAES)
2. Spertoj el gazetara/telefona reto (G. PIRLOT)
3. Kion faru NI
4. Argumentaro/kontraŭargumentaro

---------------------------------

1. INFORMADO ĜENERALE

1.1. En debato aŭ forumo oni povas esti alfrontita al malfacilaj demandoj.
1.1.1. Plej bone fari mem la demandojn, ĉar demandanto fakte regas la situacio[n]
1.1.2. Rebati demandojn per demandoj aŭ respondi demando-forme.
Kiu demandas estas en la plej konforta pozicio.
1.1.3. Silento povas esti tre valora.
Silento povas esti vere tranĉa. Ĝi ne povas daŭradi. Solvo devas sekvi.
1.1.4. Pravigi la alian, aldonante : "sed ...".
Flati la kontraŭulon. Zorgi ke li/ŝi estu kontenta pri vi.
Montri sin favora al la ideo de la kontraŭulo.
Meti sin propravole en malpli alta situacio.
1.1.5. Se la kontraŭulo estas same ruza kiel vi, klopodi estis pli ruza.
Silento povas helpi aŭ peti denove klarigi por gajni tempon.

1.2. Rebato skriba (al gazetoj).
1.2.1. Konvinki la kontraŭulon verŝajne ne estos eble. Cetere en skriba rebato oni ne konvinku la argumentinton, sed jes la leganton. Tiu ĉi sekvas la batalon inter la plum-batalantoj, laŭ ID, kiel matĉon.
1.2.2. Gazetleteroj (ensenditajoj)
1.2.2.1. Eblas ke, je rebato de ensendita letero, la leganto ne legis la unuan leteron kaj do ne plene komprenas la diskutatan temon. La komparo kun matĉo do ŝajne ne tute validas.
Okaze de tia rebato, aldonu kopion de via letero por la persono al ki vi respondas.

el NORVEGA ESPERANTISTO

# LINGVA PAĜO

## DIVANO KAJ DOGANO

Vi rajtas miri, kiam vi ekscios, ke divano, vorto, kiun la araboj ricevis el la persa lingvo, origine estis la nomo de skribaĵo. Goethe verkis poemaron, kiun li nomis "West-östlicher Diwan". La vojo de la signifo "skribaĵo" al la signifo "kalkula libro" ne estas longa, nek la vojo de "kalkula libro" al "oficejo". Tiel la franca vorto douane ekestis, la sama vorto kiel la Esperanta dogano, la itala dogana, la hispana kaj portugala aduana. Kiam la oficejo enhavis malaltan kuŝsofon, la nomo divano povis transiri ankaŭ al la sofo. La germanoj diras Zoll, la danoj told, la svedoj tull, kaj la norvegoj toll. Jam en la malnova norvega lingvo oni konis la vorton tollr, kiu venis el la mezaĝa latino: tolonium. Tiu vorto estas la latina telonium, influita de la latina verbo tollere, kiu signifas "levi". La romanoj prenis la vorton el la greka: telónion, kiu estas la vorto, kiun ni trovas ĉe Sankta Mateo 9,9, en la greka teksto, la loko, kie oni legas: "Kaj Jesuo, forpasante de tie, vidis viron nomatan Mateo, sidantan ĉe la impostejo ..." En la greka lingvo télos signifas imposto, tributo, kaj ni retrovas tiun vorton en filatelio, kies unua elemento, fil, estas la greka phil, "amiko de", kaj la dua estas atéleia, "seneco de imposto" (la komenca a estas nea partikulo). En "Anabasis" de Xenophon (Ksenofono) atéleia signifas "libereco de servado".

Johan Hammond Rosbach

# PROTOKOLOJ

STUDOTAGO DE SABATO 4-A DE DECEMBRO 1982 EN ESPERANTODOMO, ANTVERPENO

TEMO : GAZETARA REBATSERVO, KIEL ARGUMENTI/KONTRAŬARGUMENTI.

Partoprenantoj : (alfabete)
Annie BOLLAERT, Jan BOVENDEERD, Albert CLAESEN, Herman DECEUNINCK, Petro DE SMEDT, Ivo DURWAEL, Germain PIRLOT, Guido SCHROEYERS, André STAES, Herman VAN EYNDT

Gvidas : Petro DE SMEDT

Komenco : 14.15 h.

PDS proponas jenan tagordon :

1. Informado ĝenerale (Andre STAES)
2. Spertoj el gazetara/telefona reto (G. PIRLOT)
3. Kion faru NI
4. Argumentaro/kontraŭargumentaro

---

1. INFORMADO ĜENERALE

1.1. En debato aŭ forumo oni povas esti alfrontita al malfacilaj demandoj.

1.1.1. Plej bone fari mem la demandojn, ĉar demandanto fakte regas la situacion

1.1.2. Rebati demandojn per demandoj aŭ respondi demando-forme.
Kiu demandas estas en la plej konforta pozicio.

1.1.3. Silento povas esti tre valora.
Silento povas esti vere tranĉa. Ĝi ne povas daŭradi. Solvo devas sekvi.

1.1.4. Pravigi la alian, aldonante : "sed ...".
Flati la kontraŭulon. Zorgi ke li/ŝi estu kontenta pri vi.
Montri sin favora al la ideo de la kontraŭulo.
Meti sin propravole en malpli alta situacio.

1.1.5. Se la kontraŭulo estas same ruza kiel vi, klopodi estis pli ruza.
Silento povas helpi aŭ peti denove klarigi por gajni tempon.

1.2. Rebato skriba (al gazetoj).

1.2.1. Konvinki la kontraŭulon verŝajne ne estos eble. Cetere en skriba rebato oni ne konvinku la argumentinton, sed jes la leganton. Tiu ĉi sekvas la batalon inter la plum-batalantoj, laŭ ID, kiel matĉon.

1.2.2. Gazetleteroj (ensenditaĵoj)

1.2.2.1. Eblas ke, je rebato de ensendita letero, la leganto ne legis la unuan leteron kaj do ne plene komprenas la diskutatan temon. La komparo kun matĉo do ŝajne ne tute validas.
Okaze de tia rebato, aldonu kopion de via letero por la persono al ki vi respondas.

1.2.2.2. La gazetoj ne aperigas ĉiujn leterojn. Laŭ respondeculo de grava taggazeto, nur 2% de la ensenditaj leteroj aperas.
1.2.2.3. Oni tamen atentu : argumento por unu povas esti kontraŭargumento por alia.

1.3. Respondoj.
1.3.1. Respondi evitu se vi ne estas certa.
Respondo estu sen-hezita.
Certe ne petu pardonon antaŭ ol respondi.
1.3.2. Se vi ne konas la ĝustan respondon, ne timu agnoski tion kaj proponi respondi post priesplorado.
1.3.3. Se vi opnias ke vi konas la ĝustan respondon, sed konstatas ke vi malpravas, ke vi ne estas fakulo pri la temo, ne troigu, estu konciza kaj plue silentu.
1.3.4. Se vi volas defendi vin, ne nomu tro da nomoj el la movado. Eblas ke altranguloj el la movado ne estas same altrangaj en la socio, dum altrangaj homoj el la socio povas esti simplaj membroj de nia movado.
1.3.5. Superblufite - silentu
- petu pliajn klarigojn
- gajnu tempon.

1.4. Ĉu ni lernu de politikistoj kaj/aŭ de komercistoj ?
1.4.1. La publiko ĝenerale havas antaŭjuĝojn kontraŭ politikistoj, ili ne estas konsiderataj sinceraj.
(Laŭ W. Churchill "Politikistoj pensas pri la venontaj elektadoj, dum ŝtatistoj pensas pri la venonta generacio)
1.4.2. Komercisto ne estas perdifine konsiderata nefidinda. Li ja devas pruvi ke lia varo estas valora. Li devas diri la veron (se ne la tutan veron,tamen ne la malveron)
1.4.3. Tamen oratorado ne estas senvalora. Foje la formo de parolado (oratoro) estas pli grava ol la enhavo.
Ĉio dependas de la cirkonstancoj.

1.5. Intervjuo
1.5.1. Respondi laŭvere, sen heziteme.
Se la intervjuanto evidentiĝas esti neserioza aŭ neĝentila :
- rifuzu la intervjuon
- rebatu same ne-ĝentile
1.5.2. Kiam la respondo estas finita, silentu.
Ne timu silenton.
Tamen vi uzu silenton kiel armilon, ne kiel principon.



R E B A T - G A Z E T A R A   S E R V O (Germain Pirlot)

Pripensoj el propaj spertoj.

Rebati fakte estas evitenda, ĉar tro malfrue: oni devas korekti faritajn erarojn. Pli bone faru la unuan paŝon kaj informu.

1. Antaŭ ol alfronti kontraŭulojn, ni estu bonege informitaj pri la lingvo, la E-o movado kaj la argumentoj. Se ni dubas, ni prefere silentu kaj turnu nin al spertulo.
2. Estas normale, ke la unua reago pri Esperanto estas nea.
3. Ni zorgeme atentu pri la stilo kaj ortografio, samkiel pri la prezentado.
4. Nepre ne respondu en Esperanto al informpetoj.
5. Nepre evitu polemikan, respektive malĝentilan esprimmanieron. Ili ĉiam ne-iĝe efikas.
6. Nepre sendu mallongajn leterojn al ĵurnalistoj, ĉefe kiam estas unua kontakto
7. Neniam uzu trompajn argumentojn.
8. Respondu per precizaj argumentoj, bazigante sur solidaj referencoj.
   - instituto, universitato, ... estas atestoj pri kredindeco
   - "titolita" persono, eminentulo, ... Oni kredas pli facile Profesoron, Doktoron X. ol Sinjoron X. Eble stulte, sed home !
9. Ni respektu la veron, ĉar kion ajn ni diras povas esti kontrolita.
   Do, ne parolu pri milionoj da esperantistoj, eĉ se milionoj da homoj eklernis la lingvon.
   Ni ne menciu dekojn, eĉ centojn da E-revuoj, kiam estas jam malfacile montri dudeko da ili senhonte.
   Ne ne asertu ke estas 4000 delegitoj, kiam la Jarlibro mencias nur 2.244 (Jarlibro 1981)
10. Nepre danku la redaktistaron de revuo aŭ ĵurnalo (kaj la ĵurnalisto) kiu aperigis artikolon favoran al Esperanto. Jen pura elementa edukiteco !

Pri la reagoj.

1. Ni sciigu senprokraste la informojn, malfruaj reagoj al ĵurnalo perdigas sian personecon kaj supozigas komploton.
2. Ĉar ĵurnaloj ege atentas pri la reagoj de legantoj, ni klopodu kredigi, ke ni estas pli nombraj, ekz. Skribante je la nomo de aliaj personoj, kompreneble kun ties konsenton. Tamen atentu la stilon ktp.

Pri la informado.

1. Ĝi estu regula, eĉ se oni ne ricevas respondon.
2. Ĝi povas esti en formo de traduko de interesaj artikoloj por ne-esperantistoj
3. Prefere sendu ĝin al ĵurnalisto kiun oni konas persone aŭ rekte al la ĉefredaktoro.
4. Ĉiam menciu adreson kie la informo povas esti kontrolita
   adreson de Esperanto-centro kiu povus sendi pli da informoj.

Rimarkoj.

1. Ni kunlaboru kun fidindaj personoj.
2. Utile kunlabori povas homoj, kiuj ne scipovas Esperanton, sed estas skribemaj kaj bone informitaj pri la lingvaj problemoj.
3. Laŭeble petu konsilojn al ĵurnalistoj
4. Klopodu scii je kiuj momentoj oni povas kontakti (evt. telefone) ĵurnaliston sen ĝeni lin, kaj bone notu tion

--------------------

TELEFONA ĈENO (G. Pirlot)

Kial ? Tre rapide grava informo trairu niajn klubojn kaj atingu niajn agademulojn !
Okzas ke ni havas tempon, ĉu por aperigi tion en revu(et)on, ĉu ankaŭ por dissendi specialan bultenon.
Ankaŭ povas esti ke grava informo postulas tujan reagon.

Kio ? Telefon-ĉeno devus konsisti el :
- fidindaj personoj, kiuj NE sporade agadas
- kontaktpersono kaj anstataŭanto en ĉiu telefono-zono
- regionaj kunlaborantoj

Kiel ? Kiam iu trovas gravan novaĵon li tuj telefonu al sekvonta persono en apuda telefon-zono (por malaltigi la kostojn) respektive al la anstataŭanto.
Tiu ĉi telefonu al sekvonta en apuda zono kaj al aliaj kunlaborantoj en propra zono ktp.

Konkludo : eksperimento elmontris, ke informo bezonis nur 40 minutojn por trairi ĉiujn klubojn de landa asocio.

------------

3. KION FARU NI ?
Annie Boilaert kaj Herman Deceuninck klopodos starigi gazetaran- kaj telefonan reton laŭ la ekzemplo ekzistanta en Valonio sub gvido de Germain Pirlot.
JB alvokos al kunlaboro pere de INFORMILO.
La sama estos petata de ESPERANTO PANORAMA.

4. Pro rapida tempopaso, la cetero de la programo estas prokrastita.

Fino : 18.30 h.

------------------



PROTOKOLO PRI LA ESTARKUNSIDO DE SABATO 11-A DE DECEMBRO 1982 EN ESPERANTODOMO EN ANTVERPENO.

------------------------------------------------------------------------

Ĉeestas : Roger DE SCHEPPER (RDS), Paul PEERAERTS (PP), Trees DOOMS (TD),
Hilde VAN INGELGEM (HVI), Marc VAN DEN BEMPT (MVDB), Jan BOVENDEERD (JB)
Malĉeestas : Edward SYMOENS - eksterlande
Jules VERSTRAETEN - malsana
FLEJA - ?

Prezidas : RDS
Protokolas : JB

Komenco : 14.15 h.

TAGORDO

Pro la fakto ke MVDB venis speciale por la planita kongreso en Leuven en 1983 kaj ne povas resti ĝis la fino, la unua punkto de la tagordo estu do :

1. KONGRESO 1983

1.1. Unua kunsido rilate al tiu ĉi temo okazis jam je vendredo 27 11 82 dum klubkunveno de LA VERDA STELO.
Tiun kunvenon partoprenis M.Th. HENQUINEZ, Marc VAN DEN BEMPT, Herman VAN EYNDT, Luc VAN GOOL, Jules VERSTRAETEN kaj Jan BOVENDEERD.

1.1.1. Laŭ peto de prezidanto E. Symoens, ni ne organizu kongreson nur por esperantistoj, sed same, eĉ precipe, por la ekstera mondo. Grave estas altiri la amaskomunikilojn (gazetaro k.s.)
Tiucele estas necese disponi pri grava temo.
Provizore estas elektite : "INTERNACIA KOMUNIKADO" ĉar ja 1983 estos la "Jaro de la Komunikado".

1.1.2. Gastparolanto povus esti S-ro COPPIETERS, estro de la Komisiono Pattersson kaj de servo rilate al la lingvaj malfacilaĵoj kadre de la Eŭropa Komunumo.

1.1.3. Alia festparolanto povus esti Prof. Brugmans.

1.1.4. Ni petu konsilojn kaj helpon al S-roj G. Maertens kaj E. Symoens.

1.1.5. Intertempe TD, kiu loĝas en la proksimeco de S-ro Coppieters, kontaktas lin neformale por ekscii ĉu li jam principe povas akcepti.

1.3. La kongresdatoj proponitaj estas 10 kaj 11.09 1983, ĉar la kongreso devos okazi en la unua duono de septembro, pro tio ke la universitataj ejoj, en kiuj la kongreso povos okazi, devos esti liberaj poste.

1.3. Kompreneble, helpo estos bezonata de la organizantoj. Ni alvoku al kunlaboro pere de ESPERANTO PANORAMA kaj INFORMILO.

1.4. Programo : tre interesa, laŭ Lovena kutimo.

1.4.1. FEL kaj ekz. ankaŭ APE povus okazigi sian -kutime en oktobro okazantan-

ĝeneralan kunsidon dum la dimanĉmatenaj laborkunsidoj.
FEL-estraro principe akceptas.

1.5. Kotizoj

1.5.1. Sur baze de la buĝeto proponita de MVDB, la kotizoj estu

<u>ĉ i o   i n k l u z i v e</u>

| ĝis 31 07 1983 | | ekde 01 08 1983 | |
|---|---|---|---|
| kun loĝado : | sen loĝado | kun loĝado : | sen loĝado |
| BF 1.620 | 1.120 | 1.800 | 1.300 |

1.5.2. Rabatoj : por la dua partoprenonto el la sama familio : 20 %
ekde la tria " " " " " : 40 %

1.6. Asekurado :

Laŭ ĝisnunaj informoj, asekurenda estas kapitalo de 60.000.000 F.
Laŭ la informoj, pri kiuj disponas MVDB la asekurpremio por tio estus BF 60.000,-
JB siaflanke priesploru la asekurmerkaton.

2. Aprobo de la protokolo pri la antaŭa estrara kunsido.
Krom kelkaj tajperaroj, la protokolo estas aprobita.

3. Raportado

Nenio speciala, krom rilate al ESPERANTO CENTRO.
La BTK-kontrakto finiĝis je 30 11 1982. Sekve de tio nun laboras en la Centro :

- 2 plentempaj
- 1 duontempa } oficistoj salajrataj
- 1 kvarontempa
- 2 libervolaj kontrolliberigitaj senlaboruloj.

3. LABORKALENDARO 1983

| | |
|---|---|
| 08 01 1983 - estrarkunsido | 04 06 1983 - estrarkunsido |
| 05 02 1983 - " | 03 09 1983 - " |
| 05 03 1983 - " | 11 09 1983 - ĝenerala kunveno |
| 19 03 1983 - ĝenerala jarĉefkunveno | 01 10 1983 - estrarkunsido |
| 09 04 1983 - estrarkunsido | 05 11 1983 - " |
| 07 05 1983 - " | 03 12 1983 - " |

4. ESPERANTO IN VLAANDEREN

La ekzistanta broŝuro ne plu estas aktuala.
Ĉiu ĉeestanto priekzamenos ĝin kaj alportas tiujn korektojn kiujn li/ŝi povas.
Poste JB okupiĝos pri la fina adapto.

Fino : 16.40 h.

--------------------

el NORVEGA ESPERANTISTO

**NEOFICIALA RAPORTO PRI**

**LA 67a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, ANTVERPENO, 1982**

(laŭ melodio "La doganisto en Horten", variaĵo de "Å jeg vet en seter")

Kongreso ĵus okazis en la urbo Antverpeno,
norvegoj multaj sin anoncis por la partopreno.
Tutsole aŭ en karavan', / per trajno aŭ aeroplan'
alvenis ni, ja ĉiu laŭ la propra plan'.
Ĝarden' zoologia / jen kongresejo nia,
kun interesaj kreitaĵoj en kaj ekster ĝi!
Kameloj krokodilis, / flamengoj plume brilis,
dum la esperantistoj kompreniĝis inter si.

La grandajn U.E.A.-kanonojn ĝoje ni revidis.
Jen Maertens, Tonkin kaj aliaj ĉion lerte gvidis.
Prelegojn multajn aŭdis ni, / Margrete jen prelegis pri
la krizo de infan' kaj helpo kontraŭ ĝi.
Ni aŭdis pri birdovoj / kaj pri argilaj bovoj,
pri monstroj, marvirinoj kaj alia superstiĉ'.
Sed estis granda ĝeno, / ke mankis oksigeno,
la mank' de ventolado estis granda malfeliĉ'.

Sed kelkaj kongresanoj estas ĉefe nur turistoj,
kaŭzante ja profiton nur al la bierfaristoj.
Abundis la ekskurs-propon' / laŭ ĉies gusto, ĉies mon',
per buso, ŝipo aŭ piede laŭ bezon'.
Ĉu ne originale, / kaj tute ne banale,
ke ankaŭ por promen' validas la ekskurs-bilet'?
Preferis mi senpage / la bestojn studi vage
en la ĝarden' laŭ gvido de multscia sinjoret'

Teatra la programo estis vere tre varia,
almenaŭ parte kun la aktoraro profesia.
Pri l' balo estas la kritik': / tro fantazia bru-muzik'!
ja eblis preskaŭ ne paroli kun amik'!
Fariĝis tradicio / vendadi per aŭkcio
diversajn unikaĵojn kaj strangaĵojn, kredu min!
Ĝin Tonkin profesie / gvidadis eĉ pasie
ĝis voĉo lia estis tute raŭka je la fin'!

La Komitato ĉiam havas multe da laboro,
diskutas pri raportoj plej diversaj kun fervoro;
sed ja aŭdiĝis jen kritik' / de l' Komitato kaj publik':
nenion oni aŭdis pro la akustik'.
Solviĝis la afero / subite per apero
de hom' kuranta tien-reen kun la mikrofon'.
Sed estus pli facile / se ĉiu hom' trankvile
nur irus al pupitro ĉe la fono de l' salon'!

Alvenis nun la fino en la lasta kongrestago,
Solena Fermo kun transdono de la granda flago.
Rapide pasis la kongres', / kaj ĉio estis nur sukces',
kunvenoj kaj plezur' kaj tiel plu sen ĉes'.
Ekskursoj plezurigaj, / sed ankaŭ ja ŝvitigaj
pro longa promenado perpiede tra arbar'.
Jen iuj jam foriris / dum ĉie oni diris
nun: "Ĝis revid' en Budapeŝto jam post unu jar'".

Kongresano

(ni konjektas ke tiu kanto estas de dr. Støp-Bowitz).